

Krom la menciitaj aroj, ankaŭ precipe elektitaj aroj ebligas ekzemple:

- 1) Vortoj laŭ vortspecoj (substantivoj,, interjekcioj)
- 2) Vortoj laŭ enhava nocio: bestoj, plantoj, tempoj, ktp.
- 3) Vortoj, kiuj ne apartenas al la Fundamento, tamen agnoskitaj de la Akademio
- 4) Vortoj, kiuj apartenas al la Fundamento kaj kiuj rilatas tekstilaĵojn kaj kiuj estas ordigitaj en leksikona maniero ktp., ktp.

002.6 : 621.38

AUTOMATISMA DOKUMENTADO DE SCIENCA, TEKNIKA KAJ KOMERCA LITERATUROJ PER APLIKO DE TELETAJPILOJ, HOLLERITH-MAŜINOJ KAJ ELEKTRONAJ KALKULMAŜINOJ

de H.-D. Neumann

Internacia scienca, teknika kaj komerca literaturoj tre urĝe bezonas lingvon, kiu taŭgas por aŭtomatisma dokumentado.

Pomonte la literatura aro ampleksas proksimume inter 2000000 ĝis 20000000 gazetajn, revuajn, patentajn publikaĵojn, sciigojn, ktp.

Ĉi tiu grandaro ne plu estas laborebla mane, sed ankoraŭ nur maŝine.

Sugesto: Esperanto estas ĝis nun la nura taŭga lingvo por elektronaj maŝinoj pro:

- a) la neŝanĝebleco de vortradikoj ĉe la diversaj vort- kaj tempformoj,
- b) la logika gramatiko,
- c) la klaraj difinitaj finaĵoj kiel -o, -is, -as, ktp.

Postulo: Ĉi tiun eblecon bedaŭrinde kontraŭagas la supersignoj. Ili tute ne taŭgas por ĉiuj modernaj maŝinaj informiloj kiel: teletajpiloj, Hollerith-maŝinoj, elektronaj kalkulmaŝinoj kaj multaj aliaj.

Pro tio oni devas trovi la eblecon por forigi la supersignojn.

(Literatur-indikoj: »Chemicle Titles« Aŭtomatisma dokumentada servo de Chemical Abstracts US.

»AEDA« Gmelin-Institut, Germanujo — Maŝina dokumenta servo pri atomenergio)

III Juro

Ivo Lapenna*

401 : 340/341

KELKAJ ASPEKTOJ DE LA LINGVA PROBLEMO

en

INTERNACIA PUBLIKA JURO KAJ KOMPARA JURO

I. Internacia Juro

(1) **Lingvoj uzataj.** — La fondintoj de la moderna scienco de Internacia Juro uzis la latinan, kiu estis, kiel montrite aliloke¹, la lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. La ĉefaj verkoj de tiu frua epoko **Relecciones de Indis Noviter Inventis** (1532) de la hispano Vitoria; **De Legationibus** (1588). **Commentationes de Jure Belli** (1589) kaj **De Jure Belli Libri Tres** (1598) de la italo Gentili, kiu vivis en Anglio kaj fariĝis profesoro en Oxford; **Mare Clausum** (1618) de la anglo Selden; **Mare Liberum** (1609), **De Jure Praede** (1605) kaj la mondfama **De Jure Belli ac Paccis Libri Tres** (1625) de la nederlandano H. Grotius, la plej granda el ĉiuj, kaj aliaj estis verkitaĵoj en la latina. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unu sola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. Paralele kun la malaperado de la latina en la Internaciaj rilatoj, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Multnombraj, praktike ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj de la mondo anstataŭigis ĝin en la nuntempo.

(2) **Problemoj.** — Ĉu la miltlingveco sur tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes kiujn?

*) *D-ro de juro, estinta profesoro de la Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Zagreb; nun »Research Fellow« en The London School of Economics and Political Science de la Universitato de Londono.*

¹) Vidu la studon pri »La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj«.